

Tagiĝo

N-ro 39	Bulteno de Esperanto-Junularo en regiono Ostrava, Ĉeĥoslovakio. Redaktas: In: Jan Werner, OSTRAVA-Kunčice, Na Lachu 6	Majo 1958
------------	---	--------------

Nia nuntempo kaj la taskoj.

La 12-an de marto 1958 estis kunvokita en Praha la dua kunveno de la Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato, kiun ĉeestis ankaŭ reprezentantoj de la ministerio de lernejoj kaj kulturo kaj de la Kleriga Instituto en Praha. La kunvenon prezidis D-ro J. Jermář, diskutata estis precipe propono de la statuto, kiu nun estas aprobota de la ministro.

Elektitaj sekcioj: administrativa (gvidas s. Vitek, membroj s. Ambrož, D-ro Šaturová), lingva (Prof. Kilian), literatura (s. Kořinek), propaganda (s. Malík), scienca (D-ro Izák), junulara (s. D. Kočvara). La sekcioj ricevis taskon ellabori la laboran kaj finan planojn.

Funkciado de la junulara sekcio ankoraŭ ne estas plene solvita, ĉar oni atendas esprimon de la Ĉeĥoslovaka Asocio Junulara (ĈSM), kun kiu ni ĉiukaze kunlaboros. Tiamaniere ni certe akiras pli vastan teron por nia aktivado.

La estraro estas trimembra - prezidanto D-ro Jermář, sekretario s. Vitek, kasisto s. Špūr. Ĝi rajtas mem trakti ordinaran korespond-agendon. Kunvenoj de la komitato okazas kvaronjare.

La 15-an de marto la ministro de lernejoj kaj kulturo, D-ro Kahuda, per la letero n-ro 34665/58-VII. nomis la menciitajn esperantistojn por funkcii en Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato. El lia letero ni mencias:

"La agado de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato estas bazita precipe en la oficiala kontakto kun esperantistoj kaj Esperanto-organizoj en aliaj landoj kaj en celkonscie realigata eksterlanda propagando.

Rilate internajn problemojn de la Esperanto-movado en Ĉeĥoslovakio vi direktos vin laŭ instrukcioj de la direktoro de Kleriga Instituto, kiu respondas al la ministerio de lernejoj kaj kulturo pri la tuta agado de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato.

. . . mi kredas je via klopodo, ke la agado de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato kaj de la tuta esperantista movado estu en plena agordo kun la interesoj de popoldemokratia Ĉeĥoslovaka Respubliko.

Pri ekfunkcio de Ĉeĥoslovaka Esperantista Komitato vi estos informita de ĝia prezidanto D-ro Jaromír Jermář, kiun mi komisiis per tiu ĉi funkcio.

Ĉiuj faktoj menciitaj postulas novajn labor-formojn kaj novan sintenon al laboro. Pli da memkonscio, seriozeo, pli da publika agado estas nun necesa. La periodo de nura interna perfektigado pasis, la laborkampo estas nun ankaŭ ekster niaj randoj. Ni devas renovigi aŭ kompletigi la reton de niaj regionaj delegitoj, aktivigi la grupojn kaj interligi nin helpe de respondecaj lokaj delegitoj.

Legu "Tagigon", kie vi ĉiam trovos ĝeneralajn instigojn por via plua laboro. La LD ĉiam sendu la monat-raporton ĝis la 3-a de ĉiu monato kaj al via RD kaj al la sekcio. Lenu laŭ atingoj de la ceteraj grupoj. Ne forgesu sekvi la evoluantan kampanjon en lernejoj.

Mi instigas vin, ke viaj kunvenprogramoj, via korespondado kaj la tuta laboro direktu al bona propagando de nia patrujo eksterlande. En ĉiu okazo substreku la pacigan karakteron de nia movado. Kun pac-organizoj ligu intiman kunlaboron. Laboru serioze kaj ĉiuj traktos ankaŭ vin serioze.

Tamen ne forgesu konstante altigi vian lingvan nivelon. Forte propagandu niajn junularajn lernejojn SET, kiuj estos nunjare en tri lokoj. Ĝis fino de junio vi havas eblon aliĝi al D-ekzameno (pri kapableco instrui) ĉe Ing. J. Werner (Ostrava-Kunčice, Na Lachu 6). Zorgu pri tio, ke almenaŭ

unu esperdona membro el ĉiu grupo vizitu nian Junularan Esperanto-Seminarion en SET Žimovice.
La plej laboremaj grupoj nepre baldaŭ ĝuos plurajn avantaĝojn. Ne hezitu stariĝi en vicon de Esperanto-aktivuloj!

Drahomír Kočvara
junulara sekciestro

Adreso:
Ostrava VIII, Kamenec 251/3.

HAVÍŘOV - ODRY - ČANTORIA

La lasta kunveno de esperantistoj el regionoj Ostrava kaj Olomouc okazis la 23. 3. 1958 en Havířov. 74 ĉeest. el 17 lokoj. En la ĉefa referato parolis s. D. Kočvara pri la situacio en ĈSR. Pri grupa agado raportis ges-anoj el 15 lokoj: Vítkov, Vratimov, Michálkovice, Stonava, Olomouc, Ostrava-VŽKG, Třinec, Příbor, Kopřivnice, Lichnov n/Rad., Hulváky, Frýdek-Místek, Přerov, Havířov, Odry. Pri aktualaĵoj en Pollando kaj pri UK en Marseille parolis Ing. Glajcar, sola eksterlandano. Proponoj: Resuma raportado fare de regiona peranto. Programa specialigo de la kunvenoj. Proponita E-komitato por la regiono Ostrava.

En Odry okazigos pluan renkontiĝon nova E-rondeto ĉe la uzinklubo OPTIMIT la 24-25 Majo 1958. Sabate en la hotelo Družba publika dancvespero, ludos orkestro Optimit, duonhoran programon prezentos la Estrada grupo de Junularo Ostrava. Samtempe malfermita E.-ekspozicio. Dimanĉe okazos samloke la kunveno. Referato: "Pozitivaj kaj negativaj rezultoj en E-kursoj 1957-58 en la regiono Ostrava" - J. Werner. Diskuto, raportoj, libera tribuno. (Daŭrigo: pĝ: 6)

El la vivo de junularaj grupoj

REGIONO PLZEŇ (RD: Josef Sladký, Holýšov, Výhledy 54).

Tiu ĉi regiono montras sin nuntempe plej aktiva dank' al kelkaj aktivaj rondetoj kaj danke al la RD Sladký.

El la regionaj taskoj, starigitaj de la RD, ni mencias:

1. Intergrupa interŝanĝo de propaganda materialo por elmontraj kestetoj. (La interŝanĝo kontentige funkcias.)
2. Realigo de migranta Esperanta ekspozicio.
3. Plibonigo de grupa laboro; individuaj kaj kolektivaj vizitoj inter la grupoj.
4. Renkontiĝo de esperantistoj el sudo kaj okcidento (regionoj Plzeň kaj České Budějovice) 18. 5. 1958 en la kastelo Rábí apud Sušice. - El Plzeň veturos karavano per aŭtobuso. Jam en marto aliĝis Plzeň, Chotěšov, Sýřany, Č. Budějovice, Horažďovice, Strakonice, Písek.

PLZEŇ. Kursoj A, C-D, La kunvenojn vizitas 12-20 membroj. En la A-kurso ankaŭ koreano John. En la urbo estas 2 ĉiam freŝaj montrkestoj.

21. 3. aranĝita "Jozefa vespereto" kun kantoj, anekdotoj, unuaktaĵo, societa ludo, koreajn kantojn prezentis Kim kaj John. La vesperon, plej sukcesigis s-anoj Hořejší kaj Valta.

HORAŽDOVICE. Kunvenoj, kursoj. Amikaj rilatoj kun la grupoj en Písek kaj Strakonice.

CHOTĚŠOV. Kunvenoj, kurso - 6 part., inter ili ankaŭ instruistinoj. (Se vi estas rondeto de la Kulturdomo, kial ĝi postulas por la kunvenejo 15 Kčs?).

JANOVICE n/D. Zdeněk Rusín, membro de Ostrava-Junularo, kiu pasintjare frekventis D-kurson en SET Popelná, fondis en la roto E-rondeton, en kiu li sukcese instruas.

KRALOVICE, 3. 1. 1958 fondita E-grupo ĉe la uzina klubo de "Místní hospodářství". La unuan kunvenon partoprenis 20 s-anoj el Kralovice kaj 6 el Plasy. S-anoj Miler kaj Menšík parolis pri Esperanto kaj D-ro Zamenhof. En la kurso laŭ Ĉe-metodo instruas s-ano Miler - 22 kursanoj, el ili 7 gejunuloj.

PLASY. La lerneja grupo likvidiĝis kaj kelkaj membroj transiris al la grupo ĉe la Kulturdomo. Ĉiumerkrede kunvenas proksimume 12 ges-anoj. Pri laboro de la grupo regule raportas loka gazeto "Plaské noviny".

POCÍNOVICE (distrikto Klatovy). Du junaj samideanoj varbas novajn adeptojn por Esperanto.

PÍSEK. 10. 4. okazis la finekzamenoj en A-kurso en la uzina klubo Jitex. Bone sukcesis 6 partoprenintoj (el 10 komence aliĝintaj). La perfektiga kurso daŭras. 15. 4. okazis solena kunveno kun disdonado de libropremioj al la sukcesintaj kursanoj. La librojn aĉetis la uzinklubo Jitex. En metilernejo estis en marto malfermita nova kurso por 21 partoprenantoj.

TÁBOR. La E-rondeto kontaktas kun loka filumenista grupo (kolektantoj de alumet-etiketoj). Estas promesite aranĝi propagandan Esperanto-anguleton en filumenista ekspozicio en Tábor.

HRADEC KRÁLOVÉ. En la urbo estas Esperanto nedevige instruata en la 1-a okjara mezlernejo. Aliĝis 350 gelernantoj, sed nur 80 bonprosperaj estis elektitaj por la kurso.

El letero: "La junularo ĉi tie eble neniam estos, ĉar ĉiuj estas jam pli ol 17-jaraj." - Ĉu 18-jara junulo jam ne apartenas al junularo? red.

26. - 27. 4. la EK festis sian 50-jaran jubileon. Plua regiona orientbohemia renkontiĝo okazos en Náchod.

KRÁLÍKY. Post pluraj jaroj denove aranĝitaj Esperanto-kursoj, unu en la Kulturdomo kaj unu en 11-jara mezlernejo, kie instruas Prof. Josef Cink.

BRNO. 16. 3. 1958 en la kluba kunveno prezentis la junularo programon "Printempa bukedo de poezio".

OSTRAVA VŽKG (la Junularo). Merkredaj kursoj 2A, B, C daŭras. - 5. - 10. 4. la turisma grupo vizitis per aŭtobuse Pollandon kaj ĝuis belegajn tagojn en neĝoplana Zakopané;

16. 4. oni invitis vienanon s-ron F. Lewald, kiu rakontis pri turismaj vojaĝoj tra Aŭstrio kaj Jugoslavio. Akompane estis projekciataj koloraj diapozitivoj kaj filmo. Ĉeestis 65 gesamideanoj.

La estrada grupo kunvenas ĉiulunde kaj preparas nun programon por la regiona renkontiĝo en Odry 24. - 25. 5.

La postkursaj programoj okazas nun ĉiumerkrede je la 20-a horo en "Zámek":

7. 5. Rememoroj je Pollando, partoprenintoj

14. 5. Novaĵoj en elektrotekniko. Ing. Jiří Pastor

21. 5. Majo en prozo kaj poezio. Estrada grupo

28. 5. Letervespero. -

4. 6. Arkitekturo en diversaj epokoj. Ing. Jan Werner

11. 6. La Mondekspozicio en Bruselo. - Ing. Jiří Pastor

18. 6. Gaje kaj serioze. (kabareto) - Estrada grupo

25. 6. Bedřich Smetana. (prelego kaj gramodiskoj) Vlast. Kočvara

DOLNÍ BLUDOVICE (E-rondeto ĉe la 8-jara mezlernejo de K. Gottwald). 24.3.1958 ni efektivigis en Třinec la paroladon: "Helpo de esperantista rondeto en pabatalo". Pri la prelego petis nin la Distrikta pedagogia centro en Český Těšín post la interkonsento kun inspektoroj. La prelego okazis en kadro de la solenaĵoj dediĉitaj honore al J. A. Komenský en monato marto. En la prelegejo ni faris ankaŭ malgrandan ekspozicion kaj 4 gelernantoj rakontis ankaŭ pri siaj gekorespondantoj kaj pri la spertoj en korespondado.

Nun ni fervore preparas la Internacian Sportkonkurson de Esperantistaj Lernejoj, kiu okazos 1.6.1958 dum la Internacia Tago de Infanoj (vidu la rubrikon "Esp. en lernejoj" en n-roj 37, 38 kaj la hodiaŭa).

HAVÍŘOV. E-rondeto ĉe la Kleriga Kunularo okazigis la 23.3.1958 regionan kunvenon. Partoprenis 74 gesamideanoj el 17 lokoj, ankaŭ unu eksterlandano - Inĝ. Glajcar el Polujo. 1.5. okazis letervespero. Venis ĉirkaŭ 30 leteroj kaj poŝtkartoj el 7 landoj. - Regulaj kunvenoj estas jaŭde je la 20-a horo en la Distrikta Kulturdomo en Havířov I., blok 11.

Inter ministlernantoj la intereso pri Esp-o konstante kreskas. El 50 lernantoj multaj jam korespondas kun eksterlando. 29.4. "Mladá fronta" (Ostrava eldono) aperigis pri laboro de la rondeto artikolon.

PŘÍBOR. En 8-jara mezlernejo estas ankaŭ nunjare Esp. rondeto kun 10 gelernantoj. Laŭ

Ĉe-metodo instruas ĉiun jaŭdon posttagmeze instr. A. Satték. La dua grupo de la rondeto vigle korespondas kun samaĝaj eksterlandanoj. Okaze de la Internacia Tago de Virinoj oni gratulis al patrinoj en Anglujo, Sovetio, Germanujo, Svedujo.

URBO SUB SIGNO DE ESPERANTO

Leganto de "Informilo" de Esperantista Klubo ĉe Kleriga Domo en "Znojmo estas surprizita per vasteco de esperantista aktivado, kiu suverene rompas la ŝelon de sia grupa vivo kaj penetras en la publikan vivon de la urbo. Kun ĝojo ni konstatas la sukcesojn, kiuj estas instruaj por niaj grupoj.

Koncize pri la agado: Deko da kursoj en unu jaro. Publikaj prelegoj: "D-ro Zamenhof - lia vivo kaj verko", "Esperanto en Sovetio kaj la Popoldemokratioj". Klub-programoj: "Kion mi vidis en Sovetio" (Moskva, Leningrad, Kyjev), "Ekskurse al Germana Dem. Resp.", "Tra Esperanta mondo"- fotoj, korespondaĵoj, lumbildoj k. a.

Amikaj rilatoj de la Esp. Klubo en Znojmo kun esperantistoj en la hungara Jezbereny disvastiĝis je publikaj kaj kulturaj instancoj de ambaŭ urboj. Efektiviĝis INTERFRATIĜO DE LA URBOJ Znojmo - Jezbereny. En marto vizitis Znojmon 10-membra delegitaro el Jezbereny, konsistanta el reprezentantoj de urbaj oficoj, lernejoj, uzinoj kaj kulturorganizoj. La znojma delegitaro vizitis siajn amikojn en aprilo. Krom tio oni planas reciprokajn vizitojn de teatraj kaj muzikaj ensembloj kaj de Esperanto-Kluboj. Por somero estas preparataj feriaj tendaroj.

Kunlabore kun la kulturinstancoj en Znojmo oni preparas grandan ekspozicion de infandeseĝnaĵoj. De artkomisiono elektitaj deseĝnaĵoj estos premiitaj. — Regulaj informoj pri la agado de EK en la ĉeĥlingva "Znojma Kultura Kalendaro". La prezidanto de EK reprezentas ĉiujn interesrondetojn en la urba kleriga konsilantaro. — Artikoloj kaj fotografiaĵoj pri EK en la kroniko de Znojmo. — Esperanto-fako en Distrikta Popola Biblioteko. — Esperanto-kursojn propagandis 20 elmontraj fenestroj tra la urbo.

Laŭ "Informilo" J. W.

STRAKONICE. En aprilo prelegis pri Norvegnjo s-ano Vitek. Samtĉmpe projekciata kolora filmo. V. T.

NOVÉ MĚSTO n/Metují. Honore al 50-jara jubileo kaj la regiona konferenco en Esperantiata Klubo en Hradec Králové venkis s-ano Ota Lepš el Nové Město n/Metují regionan rekordon en irado. La sukceso estas des pli valora, ke s-ano Lepš estas ankoraŭ neplenaĝa kaj per la rekordo li akiris la II-an sportklason por viroj. J. Otta

LETEROJ DE AMIKOJ

ADOLF STAŇURA: "Kvankam mi legis kaj aŭdis pri via bulteno (modesta nomo!) jam plurfoje, nur ĉi-jare mi fariĝis ĝia leganto kaj abonanto. Por ĝia nivelo mi gratulas al vi sincere.

La revueto revokas al mi rememorojn el mia antaŭmilita esperantista juneco. Tiam ni ĉi tie, en Radvanice, dum kelkaj jaroj eldonadis ankaŭ "Tagiĝon". Ĝi estis nur por nia tiama klubo kaj aperadis ĉiumonate. Tamen ni ne kapablis ĉiam plenumi la ĉiumonatecon kaj tiel la jarkolektoj restis torsaj. Multobligita ĝi estis per "hektografo", poete per ciklostilo. . . "

Por letero ni tutkore dankas al: Eli Urbanová el Praha, "Fajrero" — Moskva, D-ro Imre Ferenezky kaj Pál Balkányi el Hungario.

HAVÍROV — ODRY — ČANTORIA (Daŭrigo de 2-a pĝ.) Prezidanto de la E-grupo en Odry: s-ano Fr. Poboček, Odry, Nadační 7.

Sur la monto Čantoria renkontiĝos la ĉeĥaj kaj polaj samideanoj dimanĉe 29. 6. 1958. Sabate 28.6. aranĝos E-programon samideanoj en Třinec. Aliĝoj ĉe: Anna Milatová, Třinec, Husova 304.

15.5.1958 en teatro MALÁ SCĚNA, Praha II, Ve Smečkách 26 – monda premiero en Esperanto:

Nazim Hikmet: Legendo pri amo

Prezantas "Verda Ĉaro de Julio Baghy" – artisma kolektivo de Esperantista klubo en Praha.

EN LA GRUPO DE MOSKVAJ JUNAJ ESPERANTISTOJ

Kiam en la fino de la pasinta jaro en Moskvo estis organizata esperantista junulara grupo "Fajrero", oni eĉ ne supozis, ke dum relative mallonga tempo tiom da novaj membroj alfluos en la grupon. En decembro 1957 la grupo konsistis el dek kvin homoj, precipe el la partoprenintoj de esperantistaj renkontiĝoj en la 6-a Tutmonda Festivalo de junularo kaj studentoj. La grupanoj gvidis dekon da Esperanto-rondetoj en malsamaj institutoj kaj oficejoj de Moskvo. Nun oni kalkulas en la grupo pli ol 50 homojn kaj nombro de moskvaj Esperanto-rondetoj atingas 30 kaj ĉi tiuj ciferoj daŭre pligrandiĝas. Tio konvinke pravas pri kreskanta intereso de la junularo al lingvo Esperanto.

La grupon konsistigas lernejoj, studentoj de mezaj kaj superaj lernejoj, junaj laboristoj kaj oficistoj, pedagogoj, scienculoj.

Kaŭze de la granda alfluo de dezirantoj labori en la grupo, la malnovaj organizaj formoj fariĝis tro malvastaj kaj en februaro dum la ĝenerala grupkunveno estis akceptita la nova statuto kaj estis elektita estraro de la grupo, ĉi-kaze apartaj laborfakoj (biblioteko, kolektivaj aranĝoj, korespondado, organizado de rondetoj, propagando de la lingvo) estis komisiitaj al la plej aktivaj fajreranoj.

El la statuto:

- a) praktika uzado de la lingvo Esperanto por propagando de ideoj de la paco, amikeco kaj reciproka komprenado inter la popoloj; establado de amikecaj kontaktoj kun kolektivoj kaj unuopuloj el alilandoj; propagando de sukcesoj kaj atingajoj de Soveta Unio.
- b) organizado de lerno de Esperanto.

De tiu tempo agado de la grupo estas pli interesa kaj pli vigla.

"Fajrero" estas organizonta la ekspozicion de ricevitaĵoj, el kiuj multaj alportas en si tributon de amo kaj estimo al soveta popolo kaj ĝiaj grandaj aferoj.

La grupo mem ne havas Esperanto-rondetojn, ĉar oni destinis, ke la membroj de la grupo lernis aŭ lernas la lingvon en aliaj lokoj, kie ili laboras aŭ instruiĝas. Tamen la grupo organizas la rondetojn, propagandas la lingvon kaj ebligas al siaj anoj akiron de necesaj instruiloj, de belarta literaturo kaj gazetaro. Krome, la grupanoj, kiuj jam konas la lingvon, povas perfektigi sian konon partoprenante en literatura aŭ drama rondetoj ĉe la grupo.

Nuntempe la literatura rondeto okupas sin per kolektiva traduko de rakonto de M. Ŝoloĥov "La sorto de la homo" en Esperanton kaj la drama rondeto preparas sin por estontaj amuzvesperoj.

Konsiderinda subteno por la grupo estas renkontiĝoj kun alilandaj kaj ankaŭ sovetaĵ esperantistoj.

Ekzemple en marto la grupo akceptis prezidanton de Asocio de Esperantistoj en Pollando, s-ron A. Rajski, kiu prelegis pri signifo de la lingvo Esperanto en moderna kultura vivo, pri Esperanto-movado en Pola Respubliko kaj parolis pri siaj impresoj en la 42-a Tutmonda Kongreso de UEA en Marseille. Alia kunveno de la grupo estis dediĉita al la temo "Esperanto en landoj de la Oriento".

Ambasadoro de Demokratia Respubliko Vietnamio en USSR s-ro Nguyen Van Kinh, ĉeestinta en la kunveno, rakontis pri organizo de vietnamiaj esperantistoj. Antaŭ la grupo faris paroladon soveta specialisto s-ro D. L. Armand, antaŭ nelonge vizitinta Ĉinion. Li rakontis pri sia vojaĝo. La lingvo Esperanto liveris al s-ro Armand eblon de senpera komuniĝo kun ĉinaj kamaradoj. La parolanto informis la grupon pri la sukcesoj de ĉinaj amikoj, kiuj organizis "Ĉinan Esperanto-Ligon" kaj rekomencis eldonadi la gazeton "El popola Ĉinio". Fine al la grupo estis transdonita la standardo dediĉe sendita de Ĉina Esperanto-Ligo por sovetaĵ esperantistoj okaze de la 40-a datreveno de Granda Oktobra Revolucio.

La ĉeestantoj povis trarigardi la speciale aranĝitan standon, montrantan uzon de Esperanto en Ĉinio, Vietnamio, Japanio.

Antaŭ nelonge ankaŭ okazis la tria interesa renkonto kun ĉeĥoslovaka esperantisto Jan Neumann kaj studento-islandano A. Hanibalsson.

Ĉiuj tiuj ĉi renkontoj kun eksterlandanoj helpe de Esperanto konfirmis eblojn kaj rolon de la

lingvo por la komunikiĝo inter malsamnacianoj, por la afero de internacia amikeco kaj paco.

Lastan tempon al adreso de la grupo "Fajrero" alvenas multe da leteroj el diversaj urboj de Sovetio. Aŭtoroj de la leteroj demandas pri la internacia lingvo, pri funkciado de la grupo, pri akiro de lernolibroj kaj gazetaraj, pri organizo de Esperanto-rondetoj. La junularaj esperanto-grupoj similaj al la nia estas organizotaj ankaŭ en aliaj urboj.

La aspiro al Esperanto kiel al rimedo plifaciliganta privatajn kaj societajn internaciajn ligojn, kiel al armilo de lukto por internacia solidareco en la afero de paco kaj amikeco, ne estas hazardo, por la soveta junularo.

Ni esperas, ke proksiman tempon la lingvo Esperanto estos servigita al soveta popolo kaj la junularo prenos la decan lokon en ĉi tiu nobla afero.

USSR. Moskvo, K-9 Estraranoj: M. Giŝpling, V. Korĉagin,
poŝtkesto 1253 M. Glovinskaja
"Fajrero"

TELEGRAMO: LA LERNOLIBRO DE ESPERANTO DE TH. KILIAN APEROS SOMERE 1958.
LA ELDONEJO ELPOSTULIS LA MANUSKRIPTON KOREKTITAN LAŬ NOVAJ REGULOJ
DE LA ĈEĤLINGVA GRAMATIKO.

SKIZA RAPORTO PRI LABORO DE LA JUNULARA FAKO DE HUNGARLANDA ESPERANTO-KONSILANTARO.

(Januaro 1957 – la 15-a de aprilo 1958.)

La stato de la junulara esperantista movado antaŭ la fondo de la Junulara Fakoj:

En la jaro 1956 la hungara esperantista movado atingis belajn rezultojn. Unuafoje en la historio de la junulara esperantista movado okazis, ke ni povis oficiale reprezenti nian movadon en la ĉeĥoslovakaj Esperanto-aranĝoj. Nia delegito partoprenis la Jarkunvenon kaj Someran Tendaron de la esperantista junularo, kiu okazis en Hradec u Opavy kaj Žimrovice.

Same unuafoje en ĉi tiu jaro la hungara presorgano komencis publikigadi artikolojn pri la esperantista movado. Oni devas menciigi precipe la hungarlingvan gazeton de la Tutmonda Federacio de Demokrata Junularo.

La 20-an de aŭgusto 1956 okazis en Budapeŝto la II-a landa Esperantista Renkonto, en kies kadro oni aranĝis ankaŭ junularan laborkunsidon. La ĉeestintoj prononis, ke oni devas fondi Junularan Fakon de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro por pli bone organizi la fakrondojn kaj kursojn.

Jam en tiu ĉi periodo funkciadis en kelkaj lokoj Esperanto-rondoj: en Budapeŝto, Esztergomtábor, Vasvár, Répcseszentgybry, Battonya ktp.

Grandan atenton ni montris por la internaciaj rilatoj. Ni havis okazon persone pritrakti la problemojn kun la ĉeĥoslovakaj gesamideanoj. Laŭ la spertoj ni multon povas danki al la ĉeĥaj gesamideanoj!

La laboro de la Junulara Fakoj:

La unua tasko estis: kontaktiĝi kun niaj rondoj, doni al ili helpon en la grupa vivo, en la organizado. Poste ni pretigis nian laborplanon, laŭ kiu ni decidis, ke ni efektigos traktadon kun la landa junulara organizaĵo en la afero de partopreno ĉe la Junulara Festivalo en Moskvo.

Finfine ni sukcesis du personojn sendi oficiale al la Junulara Festivalo. La gvidanto de la delegitaro estis Dro Imre Ferenczy. En la kadro de la Festivalo interalie ni prezentis kolorfilmon esperantlingvan pri la vivo de la hungara junularo.

Por la 1957-jara ĉeĥa SET ni sendis reprezentanton, kiu gajnis multajn valorajn spertojn en la organizado de SET. Ankaŭ tiu ĉi partopreno plifortigis la amikecon de la frataj popoloj.

En tiu ĉi jaro en nia lando funkciis entute 22 junularaj Esperanto-rondoj. La 20-an de aŭgusto 1957 okazis la I-a Landa Junulara Esperanto-Renkonto. La ŝtata fervojo donis al la partoprenantoj vojaĝrabaton. La gejunuloj havis okazon amike diskuti la problemojn, raportoj pri la sukcesoj ktp.

La 30-an de marto okazis en Budapeŝto Junulara Esperantista Laborkunsido, kiun ĉeestis pli

ol 60 gejunuloj el la hungara ĉefurbo. La partoprenintoj aŭskultis la raportojn pri la aktualaj taskoj de la hungara junulara esperantista movado.

Niaj internaciaj kontaktoj plifortiĝis. Ni efektivigis kontakton kun la ĉeĥa, bulgara, soveta Esperanto-organizaĵoj. Antaŭ nelonge ni aliĝis oficiale al la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Nia prezidantaro decidis, ke oficiale ni sendos reprezentanton al la 14-a Internacia Kunveno de TEJO, kiu okazos en la Germana Federacia Respubliko.

(Pli detalan raporton diskutis kaj akceptis la Prezidantaro de KEK en sia kunsido la 19-an de aprilo 1958 en Budapeŝto.)

HEK Junulara Fako.

SET en Hungario.

Ĉijare somere en Esztergom oni aranĝos Junularan esperantistan tendaron. La dektaga tendumado donos okazon por lerni la lingvon, historion kaj literaturon de Esperanto. Pri tiu ĉi aranĝo publikigis iritervuon la hungara semajne aperanta junular-gazeto MAGYAR IFJUSAG (Hungara Junularo). La 19-an de aprilo la gazeto publikigis la jenan intervjuon:

Oni aranĝos Someran Esperantistan Tendaron en Esztergom.

Kion planas ĉijare la Junulara Fako de Hungarlanda Esperanto-Konsilantaro? - Je tiu ĉi demando respondis Dro Imre Ferenczy, la prezidanto de la Junulara Fako:

Ĉijare somere okazos unuafoje en nia lando Somera Eeperantista Tendaro por la Junularo, kiu konas la internacian lingvon. Ni atendas ankaŭ tiujn gejunulojn, kiuj interesiĝas pri la internacia lingvo. En la bela Danub-insulo de urbo Esztergom la partoprenantoj havos okazon krom la lernado ankaŭ sporti kaj amuziĝi. Al tiu ĉi tendaro ni invitos kaj gastigos ankaŭ kelkajn ĉeĥoslovakajn gejunulojn.

3-a INTERNACIA INFANA KONGRESETO

Ĝi kunigos 6 - 13 jarajn infanojn, kiuj ĉeestos la Universalan Kongreson en Mainz kaj scios paroli Esperante. Dum la gepatroj dediĉos sin al la kongresa laboro, la infanoj loĝos en Feriala Domo de Goseenheim, kie ili estos prizorgataj de speciala edukistoj. En programo estas la plej variaj infanaj amuzaĵoj, ekskursetoj, festoj ktp. La infanoj tie ankaŭ manĝos kaj loĝos. j-er

INTERNACIA JUNULAR-KONGRESO EN BERLINO DUM PENTEKOSTO

La distrikta urbestro de Berlin-Neukölln kaj Esperanto-Junularo de Berlino invitas la junajn geesperantistojn de la tuta mondo al la granda Internacia Junular-kongreso en Berlino dum Pentekosto 1958 (23-30 de majo).

Loko: Moderna lernejo en Berlin-Neukölln. Oni kunvenos, manĝos kaj dormos en unu domo. Tute proksime estas bela parko, komforta subĉiela banejo kaj grandurba medio.

Programo: Interkona vespero; akcepto ĉe la urbestro; vizito de Neukölln; socialista matenfesto; diservoj; teatrovizito; aŭtobusa rondveturo tra tuta Berlino; referaĵo; laborkunsido; okcidenta kaj orienta filmoj; sportaj kaj kulturaj konkursoj; ŝipekskurso; nacia vespero; Esperanto-ekzamenoj; internacia balo.

LJV-Gaz/III.

INTERNACIA JUNULARA SEMINARIO

La seminarion aranĝitan de Germana Esperanto-Junularo en Mainz, 26.12.1957 - 1.1.1958, partoprenis 50 gejunuloj el sep ŝtatoj. La germana gazetaro kaj radio raportis pri tiu ĉi "internacia junulara renkontiĝo sen interpretistoj".

/jm/

Organo de la Germana Esperanto-Junularo estas "Juna Germana Esperantisto", kiu estas parto de la "Germana Esperanto-Revuo". Laŭ la publikigitaj raportoj la aktiveco de tiu ĉi junularo estas konsiderinda.

/jm/

LASTMONATE EN SOVETUNIO

Unu el la fondintoj de la junulara movado esperantista en ĈSR, s-ano Jan Neumann, ree estis en Moskvo (en aprilo). Ni sciigis de li pri kelkaj interesajoj. Li vizitis kunvenon de la nove fondita junulara grupo "Fajrero", kiun ĉeestis 70 junaj moskvanoj kaj kelkaj eksterlandanoj, inter ili la vietnama ambasadoro, kiu estas esperantisto. La ambasadoro vizitas tre ofte la kunvenojn de la 40 ekzistantaj Esperanto-Rondetoj en Moskvo. Neumann vidis skriban raporton pri tio, ke 4000 (kvar mil!) civitanoj en Leningrado vizitas nuntempe kursojn de Esperanto. Li konvinkigis per montrita radiorevuo, ke la radiostacio Taŝkent elsendas regulan kurson de Esperanto. Li trafolumis ankaŭ la ĵus aperintan unuan numeron de presita organo "Armena esperantisto" verkata plejparte en la armena lingvo.

S-ano Neumann apertis la grandan gastamecon de la moskvanoj kaj venis en embarason, kiel plenumi la multajn petojn pri vizito en esperantistaj familioj.

La karavan-gvidistino de Ĉedok (Ĉeĥoslovaka fremdultrafika agentejo) el Praha miregis, kiom da amikoj Neumann havis ĉie en Moskvo; tiom da konatoj en Moskvo ŝi ne havas malgraŭ siaj ĝisnunaj dektri vojaĝoj en tiun urbon. Ŝi atingis la konvinkigon, ke Ĉedok devus aranĝi kurson de Esperanto por ŝia oficistaro. Nova surprizo sekvis, kiam li montris al si la ĵus eldonitan esperantlingvan prospekton de Ĉedok pri Ĉeĥoslovakio.

S-ano Neumann konvinkigis, ke la Esperanto-movado akiras larĝan bazon en la sovetia popolo. -jm-

NIA JUNULARA SEKCIO ĴUS RICEVIS OFICIALAN INVITON AL HUNGARA SET-2 LOKOJ

JUNULARAJ RADIO—ELSENDOJ EN ESPERANTO

Radio Zagreb enkondukis en la kadron de la jaŭdaj Esperantaj elsendoj apartan programon por la junularo sub la titolo "Junlara Tribuno". Redaktas ĝin Ivo Osibov. La unua elsendo okazis la 10-an de aprilo. Ondolongo 264 m, 0,05 — 0,20 laŭ MET.

EL BULGARIO

En Sofia Ŝtata Universitato la studentoj organizis belan solenaĵon okaze de la 70-a datreveno de Esperanto kaj de la 50-a de Bulgara Esperantista Acocio. La solenaĵon partoprenis ankaŭ universitataj profesoroj. Pri ĝi oni disdonis milojn da flugolioj-invitoj por informi la tutan studentaron en la ĉefurbo. La rezulto instigas al imitado.

Ĉe la junulara sekcio de BEA estas fondita koresponda servo, al kiu oni ĉiam povas sin adresi: Poŝtkesto 44, Sofia.

De Centra Komitato de Unuiĝo de la Popola Junularo en Bulgario oni povas peti la libreton-albumon "La Juneco de Bulgario", eldonitan en Esperanto en j. 1957. La adreso: bul. Al. Stambalijskl 11. Sofia. LJV—Gaz/III.

INFANURBO FONDITA EN HUNGARIO

Por senhejmaj infanoj kaj por tiuj, kiuj ne havas konvenan hejmon, estis fondita speciala urbeto.

S-ano Pál Balkányi tie parolis pri Esperanto antaŭ du klasoj. Kelkaj infanoj deziras lerni. Oni petas bildkartajn salutojn, infandeseĝnaĵojn, fotojn pri nia lando, pri popol-vivo, infanoj kaj eble etajn popolajn artobjektojn por la Internacia Koridoro kaj la murgazeto, kiuj servas al amikiĝo de la nacioj (kontribuie jam poloj kaj ĉinoj). Ankaŭ utilos informoj kaj bildoj pri similaj institutoj, se ili estas en la ceteraj ŝtatoj. Helpu! Adreso: direktoro Lajos Barna, Gyermekváros, FÓT, Infanurbo, Marx-tér, Hungario. (laŭ let. de P. Balkányi).

MAJO — MONATO DE AMIKECO INTER POPOLOJ EN HUNGARIO

Sendu salutojn al hungaraj esperantistaj rondoj kaj al Landa Packonsilantaro, Budapest VI, Népköztársaság utja 124. Same okaze de Landa Packongreso en Budapest, aranĝota en junio.

Kun la rumanaj esperantistoj oni preparas limrenkontiĝon. Ĉu estas eble entrepreni la saman renkontiĝon sur la limo slovaka-hungara? j-er

UEA

atingis en la jaro 1957 rekordan nombron de la membroj, nome 27.093. Nuna devizo: "Antaŭen al 30.000!"

MONDEKSPOZICIO EN BRUSELO

Tiu ĉi mondskala manifestacio de scienco, arto kaj tekniko, kiu daŭros de aprilo ĝis oktobro, venigos al Bruselo milionojn da homoj kaj nepre ankaŭ multajn esperantistojn. Tiujn atendas aro da belgaj eaperantistoj trapasintaj specialan ekzamenon de "mondekspozicia interpretisto". En kadro de la Mondekspozicio okazos en la unuaj tagoj de junio tutlanda renkonto de belgaj esperantistoj kaj dum la 10-12 de aŭgusto "Internaciaj Esperanto-Tagoj" okaze de la oficiala postkongresa ekskurso, kiun la Kongresa Oficejo en Mainz organizos por la kongresanoj.

Informojn, ĉambrojn en pensiono, hotelo aŭ Esperanto-domo, ekskursojn tra Belgujo kaj ĝis Parizo per aŭtomobilo aŭ aŭtobuso vi povas peti ĉe del. de UEA kaj estro de Turisma Servo: Touaseyn Camille, Statiestraat 35, Jabbeke, Belgujo. J. W.

UNESKO PRI ESPERANTO

En bulteno de Unesko Features, dissendata proksimume al 10.000 redakcioj en la mondo, aperas informoj pri kultura agado de esperantistoj. Lastfoje temas pri ciklo de prelegoj pri Monda kulturo kaj civilizacio, en kiu prelegis elataraj fakuloj en kastelo de esperantistoj en Gresillon /Francujo/. Bulteno de EK Brno.

RADIO PRAHA KOMPLIMENTIS ESPERANTISTOJN

En la konata regula elsendo "La junularo de la Respubliko" la Radio Praha I menciis 20.3. 1958 dufoje Esperanton. Rekomendante al gejunuloj internacian korespondadon Rad. Krátký citis leteron de junulino el Hradec Králové, kiu rakontis pri utilo de sia korespondado en fremdaj lingvoj, inkluzive Esperanton. S-ro Krátký konkludis, ke tia korespondado povas havi eĉ eminentajn sukcesojn ekz. por la diskonigo de nia literaturo. Antaŭ iu tempo li havis en siaj manoj la libron "Bapto de caro Vladimír" eldonitan en Esperanto sur Kanariaj Insuloj. Tiu laboraĵo estas ankaŭ frukto de internacia korespondado. Kaj Rad. Krátký aprezis tiun fakton: "Mi komplimentas tian laboron de izolaj korespondantoj."

Jes, honestan laboron de esperantistoj scias rekoni ankaŭ influhavaj, honestaj neesperantistoj. Kaj en ĉi tiu kazo ĝi okazis en skalo tutŝtata. jm

VORTO " E S P E R A N T O " EN ĈEĤA FILMO

En la nova ĉarma ĉeĥa filmo "Stvoření světa" (La kreo de la mondo), desegnita de franco Jean Eiffel, aperas la vorto "Esperanto" en tiu ĉi sceno:

Dio, helpata de tri anĝeletoj, per enspiro de la animo en Adamon finas la kreon de la homo. La anĝeletoj tuj preparas notblokojn kaj kraĵonojn por intervjui Adamon: "Kia estas via unua impreso pri la mondo?" Ili ne scias, ke Adamo ankoraŭ devas lerni paroli. Ĉar la unua homo ne respondas la demandon, ili opinias, ke li ne komprenas ilian lingvon kaj demandas lin: "Ĉu vi parolas ĉeĥe. . . slovake? Do you speak English? Deutsch? Italiano? . . . Esperanton? . . ."

Nur en sekvanta amuza sceno Adamo lernas paroli kaj legi.

La parol-akompanon en la filmo faris la konata komik-artisto Jan Werich.

J. M.

PRI "SET" EN "LA ESPERO" KAJ RADIO ROMA

En la n-ro 3/1958 de "La Espero" (Stockholm) aperis artikoleto de Gustav Nilsson pri la aktiveco de la ĉeĥoslovaka esperantista junularo. La informo estas ilustrita per foto el la Tendaro en Popelná; ĝi montras s-aninojn M. Bohunová kaj Eva Petrtýlová, studentajn el la "bonega libro de VI. Novobilský pri Esperanta literaturo". /jm/

Kariero de Esperanto (Radio Roma) dissendis 2.4.1958 sciigon pri Someraj Esperanto-Tendaroj en Ĉeĥoslovakio kun la precizaj terminoj.

Radio Roma elsendas en Esperanto: marde, merkrede kaj vendrede - 18,55 - 19,10 laŭ MET.

JUNULARA ĴURNALO PETAS HELPON DE ESPERANTISTOJ

La redakcio de ĵurnalo "Popola Junularo", aperanta en 300.000 ekzempleroj, turnis sin al la bulgaraj esperantistoj petante helpon pri varbo de eksterlandaj korespondantoj. Ĉiu esperantisto povas sendi artikolojn kaj diversan materialon pri junulara vivo en sia lando. Fotoj estas danke akceptataj. Ĉiun uzotan materialon oni honorarios per libroj kaj revuoj en Esperanto. La materialon sendu al la redakcio: Bulgario, Sofia, bul. Lenin 47, "Narodna Mladeŝ".

Bulteno de Jun. BEA

BULGARA ESPERANTISTA JUNULARO KAJ LA FESTIVALO

La VII-a Monda Festivalo de junularo okazos somere 1959 en Vieno. Jam funkcias Internacia Preparkomitato por ĝia organizo. Estraro de la Junulara Sekcio de Bulgara Esperantista Asocio pritraktis la demandon rilate grandskalan utiligon de Esperanto dum la Festivalo. Estas elektita Esperanto-Festivalgrupo, kiu prizorgu la amasan partoprenon en la Festivalo, kaj aranĝu pli da feitalaj aktivecoj, kies ĉefa lingvo estu Esperanto. En tiu ĉi majo komencos aperadi bulteno "Esperanto en la Festivalo". Ricevos ĝin ĉiuj gejunuloj esperantistoj, kiuj partoprenos la Festivalon, aŭ interesiĝas pri ĝi. Por parte helpi la eldonon de la bulteno la eksterlandaj abonantoj bonvolu sendi al ni esperantaĵojn. Ni petas la tutmondan esperantistan junularon kunlabori. Adreso:

Junulara Sekcio de BEA, poŝtkesto 44, Sofia.

ESPERANTISTA JUNULARO EN POLLANDO

Ĝi fondis antaŭ nelonge sian propran sektion ĉe la Asocio de Esperantistoj en Pollando. Ni deziras al niaj najbaraj amikoj plenan sukceson kaj ĝojas je firma kunlaboro. Red.

JUNULARA ESPERANTO/REVUO

Apero de grandformata, ampleksa, ilustrita revuo, kiu pritraktu junularajn problemojn, estas sopiro de ĉiuj junaj gesamideanoj.

Ĝuste tia revuo komencos aperadi en Bulgario. Ĝi pritraktos la vivon, la laboron, la ferion de la junularo en Bulgario kaj eksterlande. En ĝi oni povos legi pri janularaj kulturaj kaj sportaj aranĝoj kaj pri la internacia junulara solidareco kaj amikeco.

La revuo aperigos ankaŭ materialojn pri la laboro de junularo por konservo de la paco, rakontojn, versaĵojn, humoraĵojn kaj adresojn de korespondemuloj. Apartan atenton la redakcio fiksos al la junularaj Esperanto-problemoj kaj al vivo de la organizoj, societoj kaj grupoj.

En la nuna jaro aperos tri numeroj de la revuo kaj en 1959 ĝi aperados ĉiumonate. La abonkotizo estas malalta, pagebla per ĉia nacia mono.

Kunlaborantoj estas danke akceptataj. Por rezervi la abonon sufiĉas sendi poŝtkarton al adreso:

CK na D. S. N. N. - Sofia, bul. Al. Stambolijski 11, Bulg.

Bulteno de Jun. BEA.

"LA JUNA ESPERANTISTO"

estas porknaba revueto, kiu aperas dusemajne. Ĉiu numero estas 8-paĝa, mimeografita (presita kiel Tagiĝo). La abonprezo estas 12 steloj aŭ 10 respondkuponoj, ankaŭ anstataŭebla per filatelaj poŝtmarkoj. Adreso de la administrejo: "La Juna Esperantisto", Hoefbladlaan 107, Den Haag, Nederlando,

j-er

"GRAJNOJ EN VENTO"

estas gazeto eldonata de la legantoj mem. "Graĵnoj en vento" estas interlerneja gazeto nun aperanta en 12 internaciaj rondoj (rondoj por 4-8, 8-15, 15-20 jaraj gelernantoj). Laŭ nombro de la grupoj ĉiu rondo aperigas ĝian propran gazeton, kiun kontribuas per sia(j) pago(j) ĉiu partoprenanta grupo. La pruvo sukcesis. Lernejoj, en kiuj ekzistas Esperanto-grupo kaj sperta gvidanto-instruisto, nepre aliĝu al "Graĵnoj en vento"! Adreso:

La Centra Oficejo de GRAJNOJ EN VENTO, 66, rue des Pina, BIENNE-BIEL, Svislando/Suisse.

j-er

"LA VERDA VOJO"

estas monata pola-esperanta revuo pri la internacia lingvo kaj ĝia praktika apliko en la literaturo, arto, filozofio kaj kulturo. El vidpunktoj grafika kaj lingva ĝi estas tre moderna. Redaktas ĝin la Interlingva Grupo de la Klubo de Juna Intelektularo "La Kurba Rondo". La neologismoj estas vaste uzataj. Leganton ĝenas manko de la supersignoj. Eldonata ĝi estas en kvanto de 10.000 ekzempleroj kaj aĉetebla ĝi estas interalie en ĉiuj kioskoj RUCH en 20 la plej gravaj urboj de Pollando.

- Esperanta eldono de la bildgazeto "POLLANDO" plu ne aperas pro nesufiĉa nombro de la abonintoj.

J. W.

JUNULARO DE LA MONDO

Revuo "La Junularo de la Mondo", organo de Tutmonda Federacio de la Demokrata Junularo, Benczur utca 34, 131. Budapest VI (Hungarujo), en sia duobla numero 8-9 de 1957 aperigis unupagan artikolon "Esperanto". Se multe da gejunuloj petus la redakcion aperigi informojn pri la junulara Esperanto-movado, oni ne povos nekonsideri la petojn. La revuo aperigas senpage adresojn de korespondemuloj. Montru al la redakcio kaj al la Federacio la utilon de Esperanto por la junularaj internaciaj rilatoj. De tiuj instancoj multe dependas, ĉu Esperanto estos uzata pli grandskale dum la 7-a Monda Festivalo de junularo.

LJV-Gaz/IV.

ENPENETRU EN LA NACILINGVAN GAZETARON!

"Červený květ" (Ruĝa Floro) - Ostrava kultur-politika monat-gazeto en ĉiu numero mencias pri kultura] okazaĵoj en Esperanto-movado. En la 3-a n-ro 1958 ni legis artikoleton "Petr Bezruč en Esperanto", kie la aŭtoro ASt, skribas pri esperantigitaj poemoj de P. Bezruč. En Esperanta traduko estas publikigitaj kvar versoj de la poemo OSTRAVA kaj la letero de la poeto sendita en la j. 1946 al D-ro T. Pumpr en Praha. j-er

LA RUBRIKO "DIVENU" kun krucenigmo devis esti ellasita pro manko de loko, same kiel la paĝo kun nova kanto.

Solvon de la krucenigmo el la 38-a n-ro sendis 10 solvintoj. (Devizo: "Abonu kaj legu nian centran cirkuleron Tagiĝo.") La konkursan premion "Sinjoro Tadeo" de A. Mickiewicz ricevas: Nad'a Jirečková el Lanškroun kaj ges-oj Lanz el Parizo. La lotado okazis 2.5. en kunveno de E-grupo en Ostrava-Hulváky. La duan premion donacis s-ano Vantuch el la menciita grupo.

KOREKTU la PRESEARON en la 38-a n-ro, pĝ. 21, en la unua verso de "Juna Kanto":
anstataŭ "Serene stelo. . ." devae esti SERENA STELO. . .

40-a n-ro de TAGIĜO aperos meze de julio!

En la proprajn vicojn.

Longan tempon jam turmentas min kelkaj ideoj ĉerpitaj el la fantazia romano "Domo kun mil etaĝoj" de nia verkisto Jan Weiss. La aŭtoro priskribas tie nepre tre rafinitajn ĝuojn preparatajn por eta nombro de elektitoj, kiuj tute pasive t. e. sen iu ajn fortostreĉo aŭ mensopeno sole ripozas, rigardas, aŭskultas, flaras, koncize dirite perceptas per ĉiuj sensoj. Tiu konstato pri tro pasiva ĝuado validas bedaŭrinde ankaŭ por nia hodiaŭo.

Ĉu vi ne kredas? Hazarde mi havas antaŭ mi la felietonon de Petr Kettner "Naskiĝas filmmastro" el "Zemědělské noviny" de la 6-a de marto. Aŭdu nur kelkajn respondojn de unu "esperdona" estonta aktorino:

"Ĉu vi vizitas teatron?" - "Ne."

"Ĉu vi legas librojn?" - "Por tio mankas al mi tempo."

"Kaj kion vi faras dum via libera tempo?" - "Mi praktikas sporton."

"Kion vi ludas?" - "Nenion, mi nur rigardadas."

Kiom oftegas similaj respondoj aŭ samspecaj asertoj, ke malplaĉas la filmaj, teatraj, koncertaj, disaŭdigaj kaj televidaj programoj, ke diversaj sportaj ekipoj (piedpilka, hokea ktp.) malbone ludas kaj mem oni nur "vetludas" en "Sazka" aŭ "Sportka". Sed provu demandi: "Kiel vi mem kontribuis al la komuna amuzo? Ĉu vi mem ludas iun muzikan instrumenton? Ĉu vi fakte praktikas ian sporton aŭ ĉu vi pasigas vian liberan tempon per iu "ĉevaletto", kiel desegnado, pentrado, modlado, alispeca verkado kts.?" Plejofte la respondo estos nea.

Kaj ĝuste en tiu ĉi pasiva rilato anstataŭ la propra agado enestas miaopinio la kaŭzo de tiom disvastigita enuo, sencelo kaj la konjekto, ke vivo estas nur griza dezerto kun raraj oazoj de diboĉo (ĉiuspeca), momentaj danc- kaj am-okazintaĵoj. Iomete mallarĝa skalo de ĝuoj, ĉu ne?

Komprenu min bone, mi predikas nek moralon nek monaĥan vivmanieron. Laŭ miaj psihologiaj spertoj homo scipovas plej bone amuzi sin mem je kondiĉo, ke li tion faras kun la intereso kaj sen profit- aŭ homor-ambicioj.

Nur tiu ĉi, kiu mem faras, praktikas aŭ verkas, kapablas ankaŭ ŝati verkojn, arton kaj atingiĵojn de aliaj personoj. Kaj ankoraŭ unu rimarko: ne supozu kaj ne atendu tujan sukceson, sed penu senĉese pliperfektigi, kiel tion ĉiam faris la orientaj majstroj.

Komencu prefere per io eta, malgranda, laŭproportia al viaj kapabloj kaj scipovoj de komencanto. Kion vi faros, praktikos aŭ verkos ne gravas tiom, nur dediĉu al la agado kaj vian koron kaj vian animon.

Per simila aktiva partopreno plivastiĝos mondo de viaj ideoj, vi mem fariĝos pli sentemaj por ĉiuspeca belo kaj fine vi pli bone komprenos talenton kaj divenos penon, kiun kostis tiu aŭ alia literatura, belarta verko aŭ sporta atingo. Kaj vi ne enuos pli, fidu min.

Tiurilate mi ĉiam rememoras la asertojn de kelkaj vizitintoj de Japanio, ke tie eĉ la plej simplaj kamparanoj ne nur scipovas admiri naturajn vidindaĵojn, sed ankaŭ eternigi ilin per simplaj kelksilabaj poemetoj. Ĉu tiu aserto pravas aŭ ne mi ne scias, sed la ideo mem al mi plaĉas.

Ke ne eblas poemoj konsistantaj sole el kelkaj silaboj? Komparu mem t. n. japanajn hajkuojn (17 silabajn - ŝemo 5-7-5). Ĉu vi post la tralego kuraĝos ankoraŭ nei ties elvokivecon?

japandevena:

ĉeĥa:

Dance alvenintaj
papilioj. Renkontiĝ'-
kiel silentaj.

Arbo apud mur'.
Pro sunradioj lastaj
birda Babeltur'.

Do, elserĉu tuj vian propran taŭgan kaj al vi konvenantan "ĉevaletan", kaj se vi kapablas, pri kio mi neniel dubas, ankaŭ penu esprimi la belon de la vivo, sed ne atendu aŭ ne supozu, ke ĝi mem venos al vi.

kata kano

LIBERTEMPO EN BULGARIO



Varna - Turka strateto.

Pasintjare en junio mi vizitis Bulgarion helpe de Ĉedok. Du semajnojn mi estis en Varna kaj vojaĝe hejmen mi vidis ankaŭ Sofion kaj Budapeŝton. Mi loĝis en tute nova hotelo tuj apud la maro, kie ni, ĉeĥoj, estis la unuaj gastoj. De la strando ni ĉie vidis nove kreskantajn hotelojn. Inter la ekaterlandanoj, kiujn ni tie renkontadis, estis plej ofte germanoj el DDR kaj poloj.

Bordoj de Nigra maro estas sen vegetaĵoj kaj la ĉeborda akvo sen fiŝoj. Pri la vetero oni diras, ke estas perfidema. Tial la maro ricevis la nomon "Nigra". Kaj ankaŭ mi povas diri, ke plej fortajn rememorojn mi havas el la ŝipveturo al Nesebar, kiu estas loko de tropika floraro kaj kameloj. La ŝipveturo el Varna daŭras kvin horojn. Ni elveturis, sed kiam ni estis sur la maro, venis granda vento kaj post unu horo ni estis ree en la haveno. Restis nur rememoro pri palaj homoj kaj marmalsano. Tamen, io bela estas en tiu batalo inter homoj kaj ŝipo kontraŭ la bruanta maro.

Dum la du semajnoj mi renkontis multajn samideanojn. Jam la unuan tagon mi veturis serĉi en la urbo Varns s-anon Ljubomír Hadĵidimitrov, kies adreson mi trovis en Esperanta gazeto. Ankoraŭ la saman tagon post la reveno mi aŭdis, ke unu bulgaro demandas mian amikon: "Ĉu vi parolas angle?" "Ne", respondis la amiko. "Ĉu vi parolas france?" Denove ne. "Kaj ĉu vi parolas Esperante?" - "Ne", sed mi aŭdiĝis jese. Dua eblo por mi uzi Esperanton. Venontan tagon en la urbo Varna mi renkontiĝis kun samideano Hristo Kovoĉev, de kiu mi eksciis, ke en la banloko Varna estas ankaŭ unu pola samideano. Dum vizito ĉe la pola samideano Wietkowski mi ekkonis ankaŭ samideanon Atanasov kun lia edzino. Ĉiuj ni poste vizitis samideanon Ĥagejev, direktoron de la hotelo Roza. Se vi veturos al Varna, ne forgesu viziti la hotelon Roza, ĉar tie estas por samideanoj rezervita unu tablo, kiun vi ekkonos laŭ la verda flageto.

Dum vizito en la urbo Varna vi devas viziti ankaŭ Esperantan rondeton "Albatros". Ne timu, ke vi ne trovos ĝin. Mi vidis la klubejon jam en la unuaj momentoj, kiam ni venis al la urbo, kiam ni veturis per aŭtobuso el aerodromo al la hotelo. La klubejo estas ankaŭ Esperanto-vendejo de diversa propagandmaterialo kaj memoraĵoj por fremdlandanoj. Ĉiutage vi trovos tie esperantistojn. Vi ekkonos ĝin laŭ la titolo "Magazeno Esperanto" kaj laŭ granda verda stelo. Vi devos enskribi vian nomon em oran libron, kie vi trovos ankaŭ nomojn de Ivo Lapenna kaj Zamenhof.

Ankoraŭ unu okazaĵo el Varna. Post la vizito ĉe s-ano Atanasov mi veturis per aŭtobuso kun la pola samideano reen al la banloko Varna kaj ni parolis Esperante. Unu bulgaro konstante aŭskultis nin kaj post dek minutoj li scivoleme demandis, unue angle: "Ĉu vi parolas la anglan?" "Ne." Poste: "Ĉu vi konas la francan lingvon?" "Ne." Kaj fine germane: "Ĉu vi konas la germanan lingvon?" "Jes", ni respondis. "Ĉu vi povas al mi diri, kialingve vi parolas?" - "Esperante", ni respondis. "Kial Esperante?", li miris. "Ĉar mi estas polo kaj mia amiko estas ĉeĥo", eksplikis samideano Wietkowski. Helpe de la germana lingvo ni post ia tempo sukcesis al li klarigi la signifon de Esperanto.

Ankoraŭ iom pri Sofio. Sofio estas moderna kaj pura urbo dank' al kutimo ne adapti, sed detruu la malnovajn kaj nevalorajn domojn, sur kies loko oni konstruas la novajn. Pura ĝi estas tial, ke oni ĉiunokte lavas la tutan urbon. Akvon oni prenas de la proksima monto Vitoŝa.

En Sofio estas dek Esperantaj vendejoj, en kiuj vi povas ricevi propagandan materialon kaj ankaŭ diversajn Esperantajn librojn.

Jam la trian fojon mi estis en frendlando kaj ĉiam mi parolis kun esperantistoj Ni deziru nur, ke la internaciaj rilatoj estu pli oftaj, ke ĉiuj povu pli facile vojaĝi eksterlanden.

Ondřej Macura.

Super PRINTEMPO EN LA AŬTUNO de Julio Baghy

Legante mi kelkfoje ploris
kun vi, herooj de l' rakonto.
Doloroj viaj min doloris,
ja mi sopiris je renkonto.

Unua am'! Poem' unua.
Betuloj blankaj supre tremis. . .
Ne, ne plu ebla lego flua!
Mi tiom, tiom plori emis. . .

Ĝis lasta paĝo mi interne
reteni devis mian ploron. . .
Adiaŭ, karaj! Por eterne
mi vin enskribis en la koron.
Eli Urbanová

ROZO

Rozo strange rava
en ĝardeno kreskis:
Kiun ajn mi pensis,
ĝi fermita restis.

Jen vin unusolan
mi nur rememoris —
kaj en la ĝardeno
rozo tuj ekfloris. -
Eli Urbanová

ELI URBANOVÁ (nask. 8.2.1922 en Čáslav, loĝanta en Praha) estas esperantistino ekde la jaro 1948 kaj jam kelkfoje ŝi atingis valoran aprezon en Belartaj Konkursoj de UEA, en branĉo de originala poezio.

La motivoj en ŝiaj versoj varias, tamen plej ofte ŝi esprimas la sopirojn de amanta virina koro.

Ŝia poemaro "Nur tri koloroj" aperos en la eldonejo Stafeto eble nunjare.

j-er

Lekanteto

Porinfana paĝo de Tagiĝo

MILOĈJO IRAS DORMI

Paĉjo sidas en sia ĉambro kaj legas. Miloĉjo venas en la ĉambron de la patro.

Miloĉjo: Paĉjo!

Paĉjo: Kion vi deziras, mia filo?

M. : Mi ne povas ekdormi.

P. : Ĉu vere? Vi ekdormos, nur kalkulu ĝis mil.

M. : (iras en sian ĉambron) Unu - du - tri - kvar -

P. : Ne laŭte, vi devas kalkuli en spirito!

M. : En kia spirito?

P. : Nu, vi devas kalkuli mallaŭte.

M. : Sed tiel vi tion ne aŭdos.

P. : Eĥ, bubo, mi ja tion ne volas aŭdi.

M. : Kial mi do devas kalkuli?

P. : Por ke vi ekdormu!

M. : Sed kiam mi ekdormos, mi ne povos kalkuli ĝis mil!

P. : Vi ja ne devas.

M. (reveninte en la ĉambron) Paĉjo!

P. : Nu?

M. : Rakontu al mi fabelon, por ke mi povu endormiĝi.

P. : Bone, aŭskultu! - Estis foje unu maljuna karbigisto ...

M. : Kio estas karbigisto, paĉjo?

P. : Karbigisto estas viro, kiu bruligas lignan karbon.

M. : Kial la karbigisto ne kuiras sur gaso, paĉjo?

P. : Sensencaĵo! La karbigisto bruligas lignan karbon en karbigota ligno-stako kaj poste li vendas ĝin.

M. : Tia akaparulo!

P. : Kia akaparulo?

M. : Nu, karbon, kiun li mem bruligas, li n darfas plu vendadi.

P. : Tion vi ne komprenas, Miloĉjo. Kaj fine, tio egalas. Tute certe vivis tiu malriĉa karbigisto meze de densa arbaro kaj havis filon, kiu nomiĝis Ciprian.

M. : Ĉu li estis ĉe filmo?

P. : Kial ĉe filmo?

M. : Ĉar li havis tian strangan nomon.

P. : Tio ne estas vero! Ĉiuj homoj tiam donadis al siaj filoj tiajn nomojn - ili havis senton por poezio. Ili ne estis tiaj stultkapuloj, kiaj ofte estas hodiaŭ.

M. : Kaj paĉjo, kian kapon havas homo, kiu donas al sia filo nomon Miloĉjo?

P. : Vi estas stultulo! - mi devas diri al vi! Tenu fine la buŝon kaj aŭskultu! - Do, la karbigisto vivis kun Ciprian en la densa arbaro. Li bruligadis lignan karbon kaj dum longaj semajnoj li nenion vidis.

M. : Arbaro ja ne estas komerca kvartalo, paĉjo. Ĉu ne povis tiu karbigisto prizorgi al si vendejon sur la ĉefplaco en Brno?

P. : Tiam estis tie ankoraŭ praarbaro kaj en ĝi vivis nur sovaĝaj bestoj.

M. : Tio estis bonega - oni pafadis tie senĉese, ĉu?

P. : Ne interrompu min konstante, Miloĉjo! - Iun tagon ekdeziris Ciprian vojaĝi. Do, li ekiris rekte post sia nazo. Nu - memkomprene - kiam estis tie arbo, li devis ĝin ĉirkaŭiri. . .

M. : Nur trankvile daŭrigu, mi nenion diras, paĉjo!

P. : Subite Ciprian haltis kiel ŝtoniĝinta. Li ekaŭdis akran sonon, kiu lin terurigis.

M. : Nu, kompreneble - timemulo!

P. : La sono eliĝis el gorĝo de belega junulino, kiun tenis terura ogro je haroj. Ciprian staris tie senvorte kaj meditis, kion fari.

M. : Ĉu li ne povis iri al telefono kaj voki la policon?

P. : Tiam ankoraŭ ne estis io simila. Krome ne estis tempo, ĉar la ogro svingis per longa glavo kaj minacis, ke li forhakos la kapon de la junulino. Ciprian subite rememoriĝis, ke li havas en la poŝo ŝtonĵetilon.

M. : Vidu, paĉjo, tio estas bona kaj utila objekto kaj vi forprenis ĝin de mi.

P. : Ĉar vi disrompus ĉiujn fenestrojn. La kuireja fenestro estas rompita, la kristala vazo en la salono estas ankaŭ krevita kaj la busto de Svatopluk Ĉech. . .

M. : Tio estas komika fabelo, ĉu, paĉjo?

P. : Vi kulpas pri tio, ke mi senĉese perdas la fadenon. Kial vi ne silentas? - Ciprian do enmetis ŝtonon en la ĵetilon, atente ekcelis kaj elpafis. Li trafis la ogron en la manon. Pro tio la glavo ŝanĝis sian direkton kaj anstataŭ forhaki la kapon ĝi forhakis nur la belegan harplekton de la junulino. La ogro falis senkonscie al la tero.

M. : Tio estis bela ogro, paĉjo!

P. : Tenu la buŝon kaj aŭskultu, aŭ mi donos al vi kapofrapon. - La ogro kuŝis en senkonscio.

M. : Eble li mortis pro apopleksio, paĉjo.

P. : Tio eblas. - Li kuŝis senkonscia kaj. . .

M. : Aŭ la ŝtono trafis lin en tempion?

P. : Ne, ĝi trafis lin en la manon.

M. : Aŭ en la mentonon?

P. : En la manon ĝi batis lin, ĉu vi komprenis?

M. : Sed, paĉjo, pro tio li ja ne estus senkonscia!

P. : Miloŝ, mi diros al vi ion. Se vi tuj ne ĉesigos viajn stultajn rimarkojn, mi frapos vin, ke via kapo forflugos. Memoru tion! - Kiam kuŝis la ogro senkonscia kaj Ciprian alproksimiĝis, la junulino lin superŝutis per plej malbelaj insultoj: "Monstro", ŝi diris, "kion vi faris? Mi estas reĝino de koboldoj. Viakulpe mi estas prirabita pri mia plej bela juvelo, pri miaj haroj. Kiel puno. . . "

M. : Paĉjo!

P. : Kion vi denove volas?

M. : Dormi!

P. : Dormi?

M. : Jes.

P. : Mi ne bedaŭros - iru dormi. Bonan nokton!

M. : Bonan nokton, paĉjo!

P. : Bonan nokton, Miloŝ.

Miloĉjo malaperas en sia ĉambro.

P. : (ĝemas) Dank' al Dio, ke mi liberigis min de li. Ankoraŭ unu minuto kaj mi frezeziĝus. Paĉjo eksilentas. La pordoj denove malfermiĝas. Miloĉjo enŝovas la kapon inter pordo.

M. : Paĉjo!

P. : Kion vi volas?

M. : Mi nur opinias - ne rakontu al mi pri tiaj aferoj, ke reĝino de koboldoj insultis Ciprianon pro la tonditaj haroj. Ŝi ja ĝojis, ke ŝi seniĝis de ili kaj ke ŝi fine povas fari al si modernan frizaĵon.

Junularo Brno

J. V. Sládek: *Piedoj*

Por stari ansero unu uzas,
 kvar estas ĉe la bovoj,
 hundo je tri petoleme ruzas,
 du sufiĉas al homoj.

Pro manko neniam fiŝo grumblas,
ĉe l' skarab' ses primiri.
Malgraŭ tio oni falas, stumblas....
Honorinda - plu iri!

Elĉeĥigis
kata kano

JSET 58

Sekretario: Vl. Kočvara, OSTRAVA VIII, Kamenec 251/3, ĈSR.

La tempo de niaj tendaroj proksimiĝas. Aliĝu senprokraste, se vi ne volas riski malakcepton. La lokoj estas limigitaj! La prospektojn kun aliĝilo postulu ĉe la sekretario.

INTERESO pri ISET-58 estas eksterordinare granda! Plzeň anoncas: Niaj membroj vizitos ĉiujn 3 tendarojn. En Lančov rezervu por ni 10 lokojn! Simile skribas Ostrava, Brno, Vratimov, Lanškroun. . .

Kiu el eksterlando? Ni invitis 8 delegitojn: Sovetio 2 (Žimrovice, Županovice), Hungario (Županovice), Jugoslavio (Lančov I), Pollando (Lančov I), Bulgario (Lančov II), DDR (Lančov II), TEJO (Žimrovice).

KAREL KRAFT informas: Al Županovice aliĝis jam samideanoj el Svislando, Nederlando, Skotlando, Danlando, Germanujo kaj Jugoslavio.

S-ano Claude Gacond el La Sagne (Neuchâtel) en Svislando, kiu aliĝis al Županovice, veturos post la kursoj al Altaj Tatroj kaj Vieno (27.7.). Li havas preparitan prelegon kun kolorbildo (7 x 7 cm) "Unu horo en svisa vilaĝo". Grupoj, kiuj volas inviti s-anon Gacond, skribu al Karel Kraft, Obořiště 100, okr. Dobříš.

En Županovice oni traktas ankaŭ pri luo de someraj kabanoj por 3-5 personoj.

En Županovice instruos ankaŭ ŝatata samideano Zdeněk Raška el Klimkovice (apud Ostrava).

S-ano G. Nilsson el Svedio:

"... Plurajn apartajn aferojn en la tendaro mi devas speciale laŭdi. Ekz. la matenan gimnastikon. Mi memoras, ke nia gimnastik- instruanto en SET iufoje min demandis pri sveda libro pri gimnastiko. Nu, certe troviĝas tiaj libroj, sed mi kun miaj amikoj ĉi tie diskutis nian gimnastikon en la tendaro, kaj ni venis al la konkludo, ke tiuj, kiuj havus ion lerni, estas ni en Svedio! Al mi tiu gimnastiko en tendaro estis agrabla, ĉar ĝi celis movigi korpon. Sed en lernejoj ĉi tie mi tre malŝatis gimnastikon, ĉar oni ĉiam nur volis ricevi pint-rezultojn kaj oni simple primokis tiujn lernantojn, kiuj ne povis atingi la plej altajn rezultojn. . . "

PAVEL SITTAUER anoncas: la tendaro en Lančov estos bone ekipita helpe de Svazarm. Hangaroj, Boatoj. Meze de julio starigota kabano. Ĉeĥo de la kuirejo Jarek Habeš nun frekventis kurson en soldata kuirejo.

24.7. haltos en la tendaro karavano de 24 svisaj gesamideanoj akompanataj de Junularo Písek. Tiuvespere okazos solena bivakfajro.

13. - 19.7. estos starigata la kabano kaj la tendaro. Ni nepre bezonos almenaŭ 8 knabojn kaj 1 knabinon (kuirado) por helpi en la konstruado. Ni do vokas niajn studentojn! helpu al ni! Aliĝu al la labor-semajno! Adreso: P. Sittauer, Třebíč, Riegrova 62.

PEPEK SOLNICKÝ informas nin, ke la preparoj bone progresas. Ĉiuj tendoj estos novaj. Pri starigo de la tendaro zorgas krom Opava ankaŭ Junularo Ostrava.

La kursanoj havos okazon ekskursi per aŭtobuso al Lázně Míru, valbaraĵo Kružberk, Karlova Studánka, Praděd, banejo Jeseník, karstaj grotoj Pomezí (prezo 20-30 Kčs).

El kroniko de Junularo Ostrava: ISET-1957

I.

Melki ŝafojn, ho knabinoj,
estas nova rito,
nun aŭskultu, tendaranoj,
kion diras mito:

Plijuniĝi volis Věrka
per la ŝafa lakto
to je ale hloupá cerka,
dělá se to takto?

Oĥ Podhradská, oh teruro,
mi konstatas sen envi':
Ĉu melkante la virŝafon
freŝan lakton havos vi?
Zd. Rusín

Konsiloj por niaj Tendaroj 1958. (mallongigita)

S-ano Křivánek organizis en Popelná inter la SET-kursanoj enketon, kiun respondis 22 anoj (t. e. proks. 26 %), plejparte el la A- kaj B-kursoj. Je la demando: "Kiel vi estas kontenta pri la instruado?" la plejparto esprimis sian kontenton, 7 petis pli multe da konversacio kaj malpli da teorio, 2 pli multe da gramatiko kaj malpli da historio kaj literaturo, 2 ĝenerale malpli ampleksan temaron, 1 skriban taskon por ĉiu venonta leciono, 1 pli bonajn lernoĉambrojn (jes ja!), 1 prelegi en la B-kategorio nur nacilingve, 1 ne interŝanĝi la instruantojn dum la kurso.

Nia opinio pri la rezulto de la enketo estas: la respondoj pri la limigo de studamplekso ne povas esti tute direktodonaj por la SET-estraro. Dum la edukado de la junularo ĝi devas subiĝi kaj ne la instruantoj. Aliokaze SET estus degradita al lernejo de ŝatokupoj. Ni konscias, ke en SET la pretendoj je la lernantaro estas altaj: en la literaturo kaj historio oni postulas de la C- kaj D-kursanoj pli multe da scioj ol iam ĉe la ŝtata ekzameno pri Esperanto. Sed ni celas eduki kapablulojn, la estontajn gvidantojn en la movado. Kaj tie ne estas konsilinde cedi en la postuloj pri kvalito. Nia somera studtendaro en sia ĝisnuna formo estas iom pli ol duonparte esperantista edukejo kaj nur duaflanke agrabla samideana feriejo en la naturo. Iam ni eble atingos ankaŭ la formon de tendaro por perfektuloj, en kiu oni plejparte ferios, inter gesamideanoj, plifirmigante siajn parolkapablon kaj sciojn kvazaŭ nerimarkate, sen speciala instruado. Tia formo de tendaro postulos kiel programgvidantojn samideanojn plej spertajn en nia lando, laŭ diversaj fakoj.

Tamen, la ceterajn punktojn de la enketo ni opinias atentindaj.

Indaj je konsidero estas ankaŭ tiuj ĉi liberaj proponoj en la menciita enketo: allasi nur partoprenontojn kun pli alta aĝolimo (en Popelná la plej junaj estis 11-jaraj); dividi la tendaron je a) infanoj, b) plenkreskuloj; aranĝi memstarajn ekskursojn de la unuopaj rondetoj ('klasoj') kun la koncerna instruanto kaj dumvoje konversacii adekvate al la atingitaj scioj (tio estus miaopinie tre utila; tiu propono similas al la konsilo de s. G. Nilsson).

Ankaŭ la kunsido de la 2-a sekcio de la "Interbabilado" 26.-28/10, en Ostrava donis konkretajn proponojn por la maniero de organizo de la someraj tendaroj. (vidu ilin en n-ro 37!).

J. Mařík

13 Julio en Hradec u Opavy (9-a h) LABORKUNVENO de Junulara Sekcio Aliĝu ĉe: V. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3, Sabate vizito en SET! Fervojobato
--

PŘÍBOR

SOMERA ESPERANTO/KURSARO - 13-27 Julio 1958.

La kursaro okazos en kadro de Uzina Klubo Tatra-Příbor.

Kursoj: elementa, perfektiga, konversacia.

Instruado nur duontage. Liberaj posttagmezoj estos dediĉataj al banado en montara rivereto Lubina, al mallongaj, sed tre interesaj ekskursoj en proksiman ĉirkaŭaĵon:

1. Kopřivnice - naskiĝloko de E. Zátopek, loko de Esp. muzeo, belegaj anguloj en proksimaj montetoj de Červený Kámen, kie estas situata 'Esperanta ripozejo' de vigla E-rondeto en Kopřivnice.
2. Štramberk kun naturaj belaĵoj, kun la groto Šipka, belega panoramo de la monto Bílá hora kaj specialaj kreskaĵoj el devona epoko.
3. Kastelruino Hukvaldy, sub kiu troviĝas naskiĝloko de Leoš Janáček, lia muzeo kaj lernejo, en kiu li naskiĝis.

Krome allogos la ĉeestantojn belegaj montaroj Javorník, Radhošť, Horečky kaj aliaj proksimaj lokoj al Příbor.

Kurskotizo kun loĝado ĉe privatuloj aŭ en komuna tranoktejo - 160 Kčs. Nutrado kostos ĉiutage 14-16 Kčs. La fervojrabaton 50% ni prizorgos por tiu, kiu aliĝos plej malfrue ĝis la 25 Junio 1958.

Instruos lingve kaj didaktike spertaj instruistoj. Esperantistoj, kiuj intencas ĝui bonege sian libertempon, nepre venu al Příbor!

Informojn sendas: Ant. Satték, Příbor, Dvořákova 744., kaj Vlad. Slaný, Ostrava-Vítkovice, Kutuzova 29.

LINGVA ANGULETO :

1.) Estas grava, ke. . . estas facila menci. . . ESTAS ERAROJ! Se la subjekto estas neesprimita, aŭ estas esprimita per infinitivo, aŭ propozicio, la adjekta predikativo ricevas adverban finaĵon -E. Do: estas grave, ke. . . Estas facile. . .

2.) Instrui lin Esperanton. - ESTAS GRAVA ERARO! Ĉe unu verbo ne povas esti du rektaj objektoj. Unu devas esti esprimita ekz. per prepozitivo (nerekta objekto): Instrui al li Esperanton. Instrui lin pri Esperanto.

3.) En la 38-a n-ro estis uzitaj vortoj netroveblaj en Filip-vortaro:
- aprezi - oceniti, na př. uměleckou hodnotu,
 - folá - bláhový
 - plonĝi - vrhnouti se střemhlav do vody k plavání;
v letectví: letět střemhlav. (nepřechodné)

J.W.

La Konkurso de TAGIĜO

La 3-an kaj 4-an taskon de la konkurso partoprenis 22 legantoj. La rezultoj:

3-a TASKO

- B: 1. Božena Schwetterová (Haviřov) – 10 p.
2. Jiřina Kohoušková (Opava) – 9 p.
- C: 1. Libuše Jonášová (Ústí n/Labem) – 8,5 p.
2. Zdenka Rejlová (Třebíč) - 7, 5 p.
- D: 1. Zdeněk Čapek (Praha) – 9,5 p.
2. kata kano - 9,5 p.
3. Marie Bohunová (Nová Paka) - 8, 5 p.

4. Vladimír Novotný (Praha) - 8 p.

4-a TASKO

- B: 1. Jiřina Kohoušková (Opava) - 9 p.
2. Ludmila Reiserová (Havířov) – 8.5 p.
3. Rudolf Fukala (Dolní Bludovice) - 6 p.
4. B. Schwetterová 5. V. Ruzková; 6. Svoboda eksterkonkurse gajnis 9 p.
- C, D: 1. Zdeněk Rusín (Janovice n/Úhl) - 10 p.
9. Vladimír Novotný (Praha) - 10 p.
3. Marie Bohunová (Nová Paka) - 8,5 p.
4. O. Svoboda (8,5). 5. O. Schwetter, 6. J. Kopřiva, 7. L. Jonášová, 8. Fr. Maděryč.

Tradukoj de la 4-a tasko:

- B: 1: Kiom jara (aĝa) vi estas? Kian aĝon vi havas?
2: Mi estas 20-jara. Mi havas 20 jarojn. (jara - jaraĝa)
3. Kioma horo estas? 4. Ĝuste estas la tria (horo) kaj dek minutoj. - dek minutoj post la tria.
5. Venu duonon antaŭ la sepa. - post la sesa (horo). Venu je la sesa kaj duono. kaj tridek (minutoj).
6. Li malfruiĝis je unu kaj duonhoro - je unu kaj duona horoj. Li venis malfrue je. . . Li venis post. . . malfruiĝo.
7. Kioma estas hodiaŭ? Kiu dato estas hodiaŭ? Kiun daton ni havas. . . 8. Hodiaŭ estas la 25-a de marto 1958.
9. Li aĉetis por (al) mi kvaronon de torto.
10. Solvi ĉion per unu fojo.
- C, D: Koncerne (rilate) tion mi estas kontenta. Koncerne, rilate al tio. . . 2. Escepte de li venu ĉiuj. Escepte lin ... Krom li ... 3. Kompare kun vi li ne sukcesos. En komparo kun vi li ne havas ŝancon. 4. Pro tiu ĉi kaŭzo mi ne povas kredi al vi. Kaŭze de tio. . . (kaŭzo – kialo) 5. Spite tion (malgraŭ tio) vi lernigis al li Esperanton. - vi elinstruis lin pri Esperanto. 6. Estas grave, ke vi ĉeestu. 7. Estas facile pri tio mencii - mencii tion. 8. Pere de mia frato estas eble tion realigi (efektivigi) - tio estas efektivebla. - oni povas tion. . . 9. Merite de ilia interveno ni povas esti trankvilaj. Danke al Dank' al... 10. Kun lia helpo mi sukcesos. Helpe de li. . . Pere de lia helpo. . .
- Rim.: Krom la cititaj tradukoj ekzistas ankoraŭ aliaj korektaj tradukebloj.

Hodiaŭ ni metas antaŭ vin la lastajn du taskojn. Al partopreno ni vokas ankaŭ tiujn, kiuj ignoras ĝin (Brno., Ostrava, Plzeň k. a.). La kontribuaĵojn sendu al la redakcio ĝis la 25-a de junio! 10 plej bonaj kaj plej diligentaj konkursantoj estae premiotaj!

5-a TASKO:

Pripensu, kiu porjunulara libro en la ĉeĥa literaturo estas tradukinda en Esperanton. Sciigu al ni, kiun libron vi konsideras tia kaj kio vin kondukis al la elekto. Aldone traduku el ĝi fragmenton:

B-kategorio: proksimume 10 facilajn liniojn laŭ via elekto.

C,D-kategorioj: proksimume unu paĝon laŭ via elekto.

Ne forgesu mencii: aŭtoron, ĉeĥan titolon kaj parton, paĝon, kiun vi tradukis.

6-a TASKO:

Poetoj, verkistoj, pentristoj, komponistoj! Ho, ne nur tiuj alt-titolitoj, sed vi ĉiuj povas partopreni la 6-an taskon: verki poemon, rakonton, felietonon, skizon, desegnaĵon, pentraĵon aŭ komponaĵon, kiu rilatas al la vivo en Somera Esperanto-Tendaro. Vi, kiuj estis en SET, prilaboru viajn riĉajn travivaĵojn, pritaksu la signifon de SET por nia movado! Vi, kiuj ne ĉeestis, devas labori laŭ via imago.

GRANDURBA UTAO.^{x)}

(Konkursa kontribuaĵo, tasko 3-a.)

Post brilaj glasoj
enuas la riĉuloj.
Levitaj nazoj
malofte zorgi emas
kiun pavim' vivtenas.

kata kano

^{x)} utao (aŭ tanka) japana 31-silaba poemo laŭ ŝemo 5-7-5-7-7.

Pro troa materialo "el la movado" ni prokrastas la publikigon de venkintaj konkursaj kontribuaĵoj ĝis la venontaj numeroj. Red.

ESPERANTO EN LERNEJOJ

Redaktas: Oldřich Schwetter, instruisto. Havířov I, blok 14/67.

En kiuj lernejoj estas Esperanto instruata?

Kiam estis fondita nia rubriko "Esperanto en lernejoj" (T. N-ro 37), oni starigis ĝian celon. La unua tasko estis: Ekscii, kie ĉie en nia respubliko estas Esperanto instruata en lernejoj kaj internulejoj. Hodiaŭ mi povas nur parte respondi ĉi tiun taskon, ĉar certe ekzistas lernejoj, kie Esperanto estas instruata, kaj kiuj ankoraŭ ne aliĝis (s-ano J. Hylák el Plzeň, s-ano E. Geleta el Nové Zámky). Bedaŭrinde ne respondis eĉ tiuj, kiujn mi rekte petis, ke ili sciigu ion pri sia laboro (s. M. Prašivková el Buišov n/B., s. L. Jíra el Jablonec n/Nis., s. B. Švidrnoch el Ostrava-Vítkovice). Kie restis vi, la ceteraj gesamideanoj kaj geinstruistoj el ĉeĥaj landoj kaj precipe el Slovakio? Ne silentu, ni scivolas pri via laboro. Ne hezitu kunlabori!

Nun trarigardo de la lernejoj, kie ni jam instruas:

1. 8-jara mezlernejo en Ostrava-Zábřeh - instruas s. Vlad. Slaný al 18 lernantoj
2. 8-jara mezlernejo en Dolní Bludovice, distr. Č. Těšín - instruas s. O. Schwetter, instruisto, al 20 gelernantoj.
3. 8-jara mezlernejo en Jakartovice, distr. Opava - instruas s. Jan Hadámek, lernejdirektoro, al 12 gelernantoj.
4. "Spojovací učňovská škola" en Vratimov, distr. Ostrava - instruas prof. M. Basl al 30 lernantoj.
5. Minist-lernejo en Havířov, distr. Ostrava - instruas s. J. Šlachta al 40 lernantoj.
6. 11-jara mezlernejo en Pardubice - instruas s. Jaromír Štechr proksimume al 25 lernantoj.
7. 8-jara mezlernejo en Příbor, distr. Nový Jičín - instruas s. Antonín Satték, instruisto, al 12 lernantoj.
8. Metilernejo VŽKG Ostrava-Hrabůvka - instr. s. D. Kočvara.
9. Uzina lernejo ČSD en Karlovy Vary - instruas s. Petr Tichota al 20 lernantoj.
10. Metilernejo de Sadská en Poděbrady - instruas s. Josef Chvosta al 17 lernantoj. (instruisto)
11. 11-jara mezlernejo en Králíky, distr. Žamberk - instruas prof. Josef Cink.

Do, jam en 12 lernejoj en Ĉeĥoslovaka Respubliko vivas nia E-movado. Mi kredas, ke la nombro de ĉi tiuj lernejoj estas pli alta. Espereble pri la ceteraj mi povos raportiri venonte, post ilia aliĝo.

Kaj vi, samideanoj kaj instruistoj, ĉu vi ne volas aparteni al ĉi tiuj unuaj pioniroj, kiuj kuraĝe vokas pri envicigo de Esperanto en la lernejojn? Nun ni estas kvazaŭ solaj, sed iam ankaŭ nia Majstro mem estis sola. Kaj rigardu nun, kiom da esperantistoj vi povas trovi en la tuta mondo. Helpu ankaŭ vi fosi nian lernejan Esperantan sulkon!

Kiu jam aliĝis al la III-a ISEL 1958 ?

1. Temple Boys' School, ROCHESTER, Kent, Anglio. - Tiu ĉi lernejo partoprenis jam dufoje la ISEL-on. En la j. 1956 ĝi venkis en la kategorio de knaboj. En la j. 1957 ĝia skipo okupis la 4-an lokon.
2. Péce-Gyárvarosi áll. ált. isk., PÉCS, Hungario. - Ĝi partoprenis ISEL-on unufoje, nome en la j. 1956. Tiam ĝi estis la dua: knaba eĉ la knabina skipoj.
3. Aylesford County Secondary School, AYLESFORD, Kent, Anglio. Unufoje ĝi partoprenis en la j. 1957 kaj la skipoj knabaj kaj knabinaj venkis en siaj kategorioj. Ankaŭ la unuopuloj de tiu ĉi lernejo estis plej bonaj. La knaboj okupis 1-an, 2-an, 3-an kaj 6-an lokon. Knabinoj estis ankoraŭ pli sukcesaj: 1-a, 2-a, 3-a kaj 4-a loko. Ĉu ankaŭ ĉi-jare la lernejo tiel sukcese venkos?
4. 10-jara mezlernejo, MINKIVCI, Ĥmelnicka oblast, Ukraino, SSSR - La lernejo aliĝas unufoje. Ni kore bonvenigas ĝin. Ĝi estas la unua lernejo en Sovetio, kiu partoprenas ISEL-on.
5. TJ Spartak ADAMOV u Brna, Ĉeĥoslovakio. Ankaŭ ĝi aliĝas unufoje. Estu bonvenataj!
6. Mezlernejo Kötzachenbrode, RADEBEUL, NDR. - Ankaŭ ĉi tiu lernejo estas nova adepto de ISEL. Bonvenon!
7. 8-jara mezlernejo de K. Gottwald, DOLNÍ BLUDOVICE, Ĉeĥoslovakio. - La fondinto de ISEL, kiu en la j. 1956 estis la 4-a inter 9 knabaj skipoj kaj 1a 3-a inter 5 knabinaj skipoj. La pluaj lernejoj povas ankoraŭ aliĝi, ĉar la konkurso okazos la 1-an de junio 1958 (aŭ ĉirkaŭ tiu ĉi dato) dum la Internacia Tago de Infanoj. La kondiĉoj de la sportkonkurso estas en rubriko "Esperanto en lernejoj" - Tagiĝo n-ro 37 kaj 38. Eksterlandaj legantoj, estu tiel afablaj, kaj atentigu viajn lokajn lernejojn. Dankon! - Kaj vi, ĉeĥoslovskaj Esperanto-lernejoj, ĉu vi ne aliĝos al la III-a ISEL 1958 ??

INSTRUISTO A. SATTEK (el Příbor ĉ. 744) KONSILAS AL NI:

". . . mi uzadas la rektan metodon de A. Ĉe, kiu estas por infanoj plej konvena, amuza kaj sufiĉe demonstrativa. Ĉefa afero estas instrui Esperanton amuze, interese, do tiel, ke instruisto ĉiam tenas la lernantaron en senĉesa streĉo. Komencan vortareton de infanoj mi desegnas. Tre bona helpilo estas bildoj, kiujn laŭ lernolibro (Kilian) preparis E-rondeto VŽKG en Ostrava-Vitkovice. Certe, ke instruisto devas vigle korespondi kaj tiel dokumenti la praktikan uzadon de Esperanto. Sub lia gvido ankaŭ la infanoj. Tio tre vigligas kaj emociigas la Esperanto-disĉiplojn. Bonega estas ankaŭ la lernolibro de Kilian, kiu tre helpas dum la instruado. Eluzu ĉiam kontakton dum internaciaj tagoj: de studentoj, de virinoj, de infanoj ktp. Ne forgesu instrui ankaŭ konvenajn kantojn. Ili tre vigligos vian instruadon!

Ekzemplo de komenca vortareto:



ktp. laŭ ebleco de instruisto.

Ne instruu pasive, sed aktive! Lasu infanojn tre ofte ĥore respondi! Gramatikaj reguloj ne estas la ĉefa afero de instruado, sed praktika parolo, intervjuoj; el frazoj la infanoj mem deduktos la regulojn!"

S-ano A. Satték estas sperta instruisto, kiu jam de la j. 1936 instruadas Esperanton en lernejoj, en diversaj klasoj kun sukceso (kaj jam ankaŭ malsukceso - kiel li mem skribas). Do, ni danke akceptu liajn bonajn konsilojn. t

Esperanto-instruistoj, kiu el vi transdonos al ni viajn spertojn? Vi tiel helpos sukcesigi nian laboron en lernejoj kaj kursoj. Do, ne estu skribavaraj. Skribu ĉiuj, kiuj havas bonajn eĉ malbonajn spertojn. Ĉiu via sukceso ĝojigos nin, ĉiu via malsukceso instrukcios nin!

Mi kredas, ke s-ano Satttek estas nek la unua nek la lasta, kiu transdonis al ni siajn spertojn.

Anoncetoj

KORESPONDAN KURSON DE ESPERANTO gvidas a-ano Frant. Svačina, Lanžhot. Aliĝante indiku: nomon, profesion, adreson kaj la naskiĝdaton.

SERĈATA: "Gramatiko de Eŝperanto" kompilita de J. Kožený kaj Ĉe-metodaj tekstoj de Seppik. Proponojn kun indiko de la prezo sendu al red.

KORESPONDI DEZIRAS:

HUAGARIO. 12-18 jaraj kursaninoj dez. kor. kun samaĝaj gejunuloj. Skribu al: Pál Balkányi, Budapest II, (Pesthidegkut), Haraszt-utca 33.

POLLANDO. Andreo Pettyn, MILANÓWEK, woj. warszawakie, ul. Kosciuszki 24, dez. Kor. kun gejunuloj interalie pri muziko kaj interŝanĝi muziknotojn.

ESPERANTAĴOJ:

ISET-leter-kovertoj po 15 heleroj kaj ISET-poŝtkartoj (laŭ desegnaĵo de D. Bartošík) po 25 heleroj estas aĉeteblaj ĉe: Draĥ. Kočvara, Ostrava VIII, Kamenec 251/3.

"Kroniketoj de Junularo Ostrava" kun 7 fotoj, kies temo estas SET, kostas nur 5 Kčs

Ni dankas al niaj subtenantoj: Vítovec J., Vodňany Kčs 13,- Miler Václav, Královice 3,- Hromada R., Praha 8, - Krátký R., Praha 8, - Marek Ol. Žamberk 3, - Grich Eugen, Nižná Slaná 8, - Pomykacz, Třinec 8, Jordán, Ružomberok 8,- Škrobák, Ostrava 1,- Kochman J., Praha 13, - Komzáková, Tábor 8, - Pacák, Kolín 10,- Mejtský Čest., Brná 3,- Jonášová Lib., Ústi 3,- Štěpánek St., Netolice 8,- Rybová Jar., Brno 8,- Burda Rud., Plzeň 3,- Marková M. Písek 3,- Brankytl J., Ostrov 8,- Bystřický R., Fr. Lázně. 9,- Rybín, Part. Lupča 3,- Ryšavý, Šitbořice 8,- Žahourková, Polička 8,- Kaplánek V., M. Lázně 8,- Horák Zd., Bródek 8,- Chroboczek B. Horní Suchá 15,- Střihavka, Kladno 8,- Tomiczek, Karviná 28,- Pecka Jablonec 8,- Michalová, Mokřý Lom 6,- Vančata E., Plasy 8, - Rasocha, Prostý 3,- Hudec, Liberec 6,- Rejllová, Třebíč 13,- Závodný, Frenštát 8,- Vondroušek, Brno 6,- Hlaváček, Praha 3,- Sekotová, Poděbrady 3, - Petráň, Žďár 3,- Lysý J., Vadovce 8,-

ELDONAS: Esperantský odbor Domu osvěty P. Bezruče v Opavě

ADMINISTRAS: Jaroslav Kuzník, Opava, Mendlova 21.

ILUSTRIS: Karel Škovran, Ing. ark. M. Kalný.

T 26364-8